# Frazfarado – grupa ekzerco

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Ekzercado de konjukcioj kaj subjunkcioj frazo-konstruado. |
| **Celgrupo:** | komencantoj |
| **Antaŭpreparo:** | kartoj (modelon vidu sube) |
| **Tempo:** | 5 -10 minutoj |
| **Ludantoj:** | minimume 4 |

La ludantoj estu en grupetoj po 2 – 4 personoj, starantaj ĉirkaŭ tablo.
La ludgvidanto (instruisto) metas sur tablon, atinbeblaj por ĉiuj, kartojn kun duonfrazoj (vortoj) kaj aparte konjukcioj kaj subjunkcioj. La diverslitere indikitaj kartoj povas esti diverskoloraj.

La tasko estas elektinte el inter la kartoj kaj kunmetinte ilin krei kiel eble plej multajn sencohavajn frazojn. Unue la lernantoj klopodas akapari kiel eble plej multe da kartoj. Sed, fine de la ludo – antaŭe la ludgvidanto difinu la tempon! – el la nombro de la bone utiligitaj kartoj estos substrahita la nombro de la ne-uzitaj kartoj! La restanta cifero indikas kiom da poentoj estas gajnitaj de la unuopaj grupoj.

Varianto: La grupetoj povas ankaŭ marĉandi inter si: kun „senutila' karto iri al la alia(j) grupeto(j) por ŝanĝi ĝin al „uzebla”.

Kutime regas bona etoso, kaj tiel oni pli gaje (facile) lernas la rolojn de la konjukcioj, subjukcioj.

**Ekzemplo**:

**A.**
1. Maria dormis ĝis la naŭa matene
2. Petro vizitis sian amikinon
3. Mi ne iris promeni

**B.**
1. malfruis en la lernejo
2. estis pluva vetero
3. malsaniĝis
4. poste tagmanĝis
5. portis libron al
6. ne povis fari la hejmtaskon

**C.**
1. kaj
2. ĉar
3. kaj pro tio
4. tamen
5. sed
6. kvankam

**D.**
1. ŝi
2. mi
3. li
4. ili
5. Maria
6. Petro